

Komputeko

prikomputila terminokolekto

Yves Nivelsteen

dua eldono

Tiu ĉi broŝuro estas kopirajtita. Vi ne rajtas fari kopiojn sen permeso de la aŭtoro. Vi povas ja senpage uzi la retejon de Komputeko, **www.komputeko.net**.

Komputeko estas projekto de Edukado@Interreto. Detalojn pri la ekesto kaj la evoluo de ĝi vi trovas interalie en Vikipedio: **<http://eo.wikipedia.org/wiki/Komputeko>**

Yves NEVELSTEEN (1974) studis komunikadon en Antverpeno (Belgio). Ĝis januaro 2008 li laboris kiel tradukisto de komputilaj programoj kaj verkisto de akompanaj manlibroj kaj helpsistemoj. Ekde tiam li estas sendependa eldonisto de flandra senpaga monata revuo. Lia gepatra lingvo estas la nederlanda. Profesie li uzas la anglan, francan kaj germanan lingvojn. Esperanton li lernis en la jaro 1989. Yves estas estrarano de E@I, eksprezidanto de la Flandra Esperanto-Junularo kaj aŭtoro de manlibro pri Vikipedio.

Enhavo

Enkonduko	7
Fontindikoj	8
Malgarantio	8
Lingvaj konsideroj	9
Neologismoj, nenecesaĵoj kaj oftaj eraroj	11
Parto 1: dulingva terminaro en - eo	12
Parto 2: multlingva vortareto eo - en - nl - fr - cs	97
Parto 3: bildoj kaj klarigoj	107
Parto 4: pri ĉapelitaj literoj	113
Parto 5: helposignoj	117

Komputeko - prikomputila terminokolekto

© Yves Nevelsteen (krom se indikite alie)
yves@ikso.net

Eldonis ESPERO por E@I
Peter Baláž
Vífazná 840/67A
SK - 958 04 Partizánske, Slovakio
info@espero.sk

Dua eldono kun pli ol 500 aldonoj kaj modifoj
Eldonjaro: 2012
Eldonkvanto: 500

ISBN 978-80-89366-14-9

La unuan eldonon (2008) provlegis Maŭro La Torre †, Lode Van de Velde, Paul Peeraerts kaj Fabien Tschudy. Al tiu ĉi dua eldono multe kontribuis Edmund Grimley Evans. Ĝin detale provlegis Marek Blahuš. Dankon!

Enkonduko

Mi komencis kolekti prikomputilajn vortojn en Esperanto en aprilo 2006. Evidente jam ekzistis diversaj listoj kun tiaj vortoj, sed... malkompletaj, neĝisdataj, en multaj diversaj lokoj kaj foje kun malsamaj tradukoj.

Ofte mi diskutis kun esperantistoj pri prikomputilaj terminoj (ĉu datenoj, ĉu datumoj; ĉu paragrafo, ĉu alineo; ĉu ligo, ĉu ligilo...). Esperanto, kiel ĉiuj lingvoj, evoluas: aperas multaj novaj terminoj kaj malaperas aliaj. Certe en la dissendolisto de la tradukteamo de Open-Office.org la konkludoj estas tre interesaj. Estus domaĝe ne disponigi tiujn konkludojn al pli granda rondo.

Kunlaborante al Vikipedio, tradukante interalie la permesilojn de "Creative Commons" kaj provlegante Drupalon, mi kolektis terminojn. Ĉie kie mi trovis listojn kun prikomputilaj vortoj, mi ilin aldonis al la kolekto. Mi kolektis tiel ĉi jam pli ol **7800 tradukojn** al Esperanto. Temas verŝajne pri la plej granda kaj (pli grave) plej ĝisdata kolekto de tiaj terminoj en Esperanto.

Jam ekzistas retejo de la Komputeko en kiu vi povas serĉi terminojn laŭ ŝlosilvorto. En ĝi ankaŭ aperas alklakeblaj fontindikoj; tiel ĉi Komputeko povas funkcii kiel portalo de kie vi povas iri al diversaj terminaroj kaj vortaroj en la reto por scii pli pri unuopaj terminoj.

De la komenco Komputeko estas plurlingva projekto; ne nur en Esperanto homoj malfacile havas (senpagan) aliron al bonaj tradukoj de prikomputilaj vortoj.

Jen iom da statistiko:

en 7800 - eo 7544 - nl 4928 - fr 3690 - de 3419 - es 3258 - pl 1407 - ca 314

En tiu ĉi broŝuro vi trovos nur usonanglajn terminojn kun preferata Esperanto-traduko kaj eventuale unu alternativa traduko. En la retejo de la projekto vi povas serĉi laŭ britangla, mallongigoj kaj diversaj skribmanieroj (ekz. "online, on line, on-line"). Je la fino aperas ankaŭ kelkaj paĝoj kun tradukoj de Esperanto al la usonangla.

Ĉefaj kunlaborintoj al la Komputeko-projekto estas Cindy McKee (Usono), Dennis Priskorn (Danio) kaj Maŭro La Torre (Italio). Valorajn konsilojn mi ricevis interalie de Tim Morley (Britio), Chuck Smith (Usono), Lode Van de Velde (Belgio) kaj Bertilo Wennergren (Germanio/Koreio).

Komputeko estas longdaŭra projekto. Ni celas regule ĝisdatigi la retejon kaj de tempo al tempo eldoni novan paperan version. Se vi havas rimarkojn pri tradukoj aŭ volas aldoni vorton al la kolekto, nepre informu min pri tio. Mi tre ĝojus se vi pretus kontribui al la plibonigo de la kolekto.

Yves Nevelsteen

Eksterreta versio kaj subteno de la projekto

Ekzistas ankaŭ eksterreta versio de la Komputeko en PDF-formo. Ĝin vi povas mendi ĝirante minimume € 2 al la UEA-konto ecxi-v. Informu nin pri via mendo je info@komputeko.net Se vi volas subteni tiun ĉi projekton de E@I, eblas kompreneble ĝiri pli da mono al la konto. Por pli altaj sumoj, kontaktu nin por informoj pri konto en Belgio aŭ Slovakio.

Fontindikoj

En la Komputeko mi provis ĉiam aldoni minimume unu fontindikon ĉe tradukoj de terminoj. Ĉefe kiam malsamaj fontoj rekomendas alian tradukon, povas estas interese kompari ilin. Jen superrigardo kun mencio pri kiuj verkoj temas kaj kiom ofte fontindikoj minimume aperas en la Komputeko.

1000+ OoO - OpenOffice.org-labordosiero kaj konkludoj de diskutoj en dissendolistoj kaj dum la kunveno de la tradukteamo en Cambridge en 2007.

900+ KompLeks - Komputada Leksikono de Sergio Pokrovskij.

850+ Bertin - Computer Dictionary English-Esperanto, malneta eldono de komputila terminaro de Christian Bertin. La verko multe inspiris min. Ĝi estas tre interesa fonto por kompari, ĉar la verko datas de la jaro 1985. Multaj tradukoj, kiujn proponas la terminaro, estas uzataj ankoraŭ hodiaŭ.

800+ TekVort - Teknika Vortaro angla-pola-Esperanto de Jerzy Wałaszek.

500+ Maŭro - Maŭro La Torre †, membro de la Akademio de Esperanto.

350+ ReVo - Reta Vortaro, la terminoj de la fako Komputiko.

230+ KDE - Laborvortaro de la KDE-tradukteamo.

230+ PIV2002 - Plena Ilustrita Vortaro, eldono 2002.

130+ Drupalo - Mi provlegis la tradukon de la enhav-mastruma sistemo Drupalo kaj aldonis kelkajn interesajn terminojn al la Komputeko.

120+ Lode VDV - Lode Van de Velde, eksprezidanto de la Flandra Esperanto-Ligo.

100+ Edmundo - Edmund Grimley Evans, revizianto de la parto komputiko de PIV2002.

100+ KompList - Komputila Vortlisto de Bill Walker.

80+ Pekoteko - Mi traserĉis la tri volumojn de la Plena Pekoteko, sed bedaŭrinde ne trovis multajn vortojn kiujn oni nuntempe uzas rilate komputadon.

60+ FEL - Interreta vortareto de Paul Peeraerts.

60+ Vikipedio - Nur se mankis alia fonto, mi iafoje uzis la liberan enciklopedion kiel fonton.

50+ Bertilo - Bertilo Wennergren konsilis pri kelkaj tre malfacilaj kazoj.

50+ Firefox - Mi provlegis la labordosieron de la Firefox-tradukteamo kaj farante tion aldonis kelkajn terminojn al la Komputeko.

30+ KompBaz - Komputada Baza Terminaro de Gerhard Kalckhoff kaj Antony C. Pick.

Aliaj fontoj: Ipernity, Facebook, Vim, Cindy McKee, Chuck Smith, Brian Russell, Petro Desmet...

Malgarantio

Ĉiujn terminojn kaj fontindikojn mi mane aldonis al la datumbazo. Mi ne povas doni garantion pri la fontindikoj. Se vi volas esti certa, indas ĉiam kontroli en la verkoj mem. Ne ekzistas aŭtomata ligo inter la Komputeko kaj la fontindikoj. Se intertempe la aŭtoro de verko ŝanĝis tradukon, ne ĉiam mi povas scii pri tio.

Lingvaj konsideroj

Faka/ĉiutaga vorto

Se temas pri faka afero/agado/funkcio, vi certe rajtas uzi fakvorton - ekzemple "pivoti" estas faka agado en tabelkalkulilo; oni bezonas iom da sperto aŭ klereco por scii pri kio ĝi temas, aŭ kiam uzi ĝin. Se temas pri ĉiutaga afero/agado/funkcio, prefere uzu ĉiutagajn vortojn por priskribi ĝin, por ke malsperta uzanto ja komprenu la vorto(j)n.

Infinitivo/imperativo

La tradukteamo de OpenOffice.org uzas la jenan regulon pri uzado de imperativo en surekranaj tekstoj kaj menueroj: oni uzu ĝin kiam temas pri instrukcio al la uzanto, ekz. "Entajpu vian pasvorton" aŭ "Elektu el la ĉi suba listo". Krom tio, oni uzu i-formojn: "Konservi la dosieron", "Kopii la tekston", k.s.

Majuskloj

"Enmeti Filmon kaj Sonon" kun tri majuskloj estas sufiĉe nekutima stilo en Esperanto. Prefere uzu "Enmeti filmon kaj sonon". Ene de la tradukteamo de OpenOffice.org oni decidis uzi majusklojn nur komence de fraz(er)oj. Laŭ PMEG, se oni faras el propra nomo alian vorton, kiu mem ne estas propra nomo, oni normale konservas la majusklon (ĉar la propranoma parto de la vorto restas propra nomo), sed oni ankaŭ povas minuskligi (ĉar la tuto ne plu estas propra nomo). La kutimoj estas tre diversaj. Komputeko aplikas la regulojn de la Monato-redakcio, kiu emas pli minuskligi.

CD ROM - DVD

"Lumdisko" estas tegmenta termino por KD-oj, DVD-oj kaj aliaj specoj de diskoj, kiuj iel funkcias per lumo (lasero). Oni registras (aŭ skribas) dosierojn sur lumdiskon. Kelkaj tipoj de lumdiskoj ankaŭ permesas kopii kaj forigi dosierojn. Viddiskoj, kiujn oni uzas por spekti filmojn, ĉiam estas nurlegaj. Povas okazi ke ili estas protektataj kontraŭ kopiado en diversaj manieroj. Kiam oni konservas dosierojn sur KD aŭ DVD, plej ofte oni parolas pri "registri sur" (to burn).

User

"Uzanto" estas malfacila vorto. "Uzanta manlibro" ekzemple neniel estas "user manual".

"Manlibro por uzantoj" aŭ "Uzanto-manlibro" estas eblo elturniĝi. Pro la neeblo diri "uzanta manlibro", kelkaj fakuloj provis enkonduki "uzula"n. Plej multaj esperantistoj, ekzemple la membroj la tradukteamo de Open Office.org, ne uzas tiun ĉi vorton, ĉefe ĉar jam ekzistas "uzanto" kaj ĉar "uzi" estas verba radiko kiun oni normale substantivigas per "-anto".

Database

En praktiko plej multaj esperantistoj tradukas tiun ĉi terminon per "datumbazo". Konsiderinda parto de la okcidentaj komputikistoj preferas la formon "datenbazo", supozeble por eviti konfuzon kun iom nebulsenca verbo "datumi" (proksimume "datiĝi, deveni de koncerna tempo, komenciĝi iam"). La formo "dateno" restas malpli vaste uzata (kaj geografie kaj sence) kaj malpli tradicia. Tial en Komputeko vi ne trovos "datenbazo".

Browser

La ĝenerala traduko de "browser" estas "foliumilo". Mi observis, ke multaj esperantistoj nuntempe uzas la terminon "retumilo" por "web browser". Tio ne estas tute ĝusta, "retumilo" estas ilo por retumi; en la angla "internet suite". "Retumi" povas same bone esti legi mesaĝojn, okupiĝi pri mastrumado de retservilo per FTP, k.s. Ekzistas ankoraŭ aliaj variantoj, kiel "krozilo". "Internet Explorer" estas foje tradukata kiel "Interreta Esplorilo". "Navigilo" nuntempe estas ekuzata kiel traduko de la angla "GPS", la aparato kiun pli kaj pli da homoj uzas en la aŭto por trovi la vojon.

Link

"Ligo" estas la ligo inter du paĝoj. "Ligilo" estas la substrekitita vorto en retpaĝo kiu per alklako ligas vin al alia paĝo.

Preview

Depende de la kunteksto, eblas uzi "antaŭrigardi" aŭ "aspekto". Tre plaĉas al mi "aspekto de la presotaĵo".

Wizard

Post longa diskutado, en la tradukteamo de OpenOffice.org oni decidis ke "asistanto" estas la plej taŭga traduko. "Asistilo" laŭ pluraj spertuloj ne eblas, ĉar "wizard" ne estas ilo por asisti, sed kvazaŭ persono kiu asistas.

Tab

En Esperanto oni klare distingas inter "tabo" kaj "langeto". Tabo estas komando, kiu en redaktilo movas la tajplokon al fiksita horizontala pozicio. Langeto estas elstara parto de komputila fenestro, facile alklakebla (ekzemple ĉe Mozilo Firefox). Tamen, principe la langetoj nur estas la supraj partetoj, kiujn oni alklakas por aperigi la respektivajn paĝojn. Vi ne malfermas langeton, sed malfermas folion alklakante langeton.

Ŝarĝi / ŝargi

"Ŝarĝi" signifas, ke oni surmetas aŭ enmetas ion, kio estu iel transportata aŭ kio pezas sur ion. "Ŝargi" signifas, ke oni enmetas aŭ surmetas ion, kio estu uzata (kio estas bezonata por ĝusta funkciado). Do oni ŝarĝas transportilojn (aŭtojn, ŝipojn...) per transportaĵoj, kaj pesilon per pezaĵoj, kaj personojn per taskoj; sed oni ŝargas fotilon per filmo, aparaton per baterio, baterion per elektro, kasedilon per kasedo, komputilon per disko, pafilon per kuglo ktp.

Bloki / bari / eksigi / ekskludi

Ĉiu membro de Ipernity povas persone "bloki" homojn. Tiam tiuj blokitoj ne plu povas komenti sub viaj fotoj. En la franca: bloquer. La tuto de la blokitaĵoj estas nomita "Listo de blokitoj".

Ĉiu administranto aŭ kontrolanto de grupo povas "bari" homojn. Tiam la barito ne plu povas aldoni ion al grupo, nek komenti en ĝi. La barado estas portempa "puno". En la franca: supprimer.

Ĉiu administranto aŭ kontrolanto de grupo povas "eksigi" homojn. Ankaŭ tiam la eksigito ne plu povas aldoni ion al grupo, nek komenti en ĝi, sed la eksigo estas definitiva. En la franca: bannir.

Estas uzata krome la verbo "ekskludi", kiu signifas bari kaj/aŭ eksigi. En la franca: exclure.

Formato / formo

"Formato" teorie temas ĉefe pri dimensioj laŭ alteco kaj larĝeco. JPG, DOC kaj PDF estas tri diversaj "dosierformoj", ne "dosierformatoj". En praktiko, ĉefe sub influo de naciaj lingvoj, multaj esperantistoj tamen (erare?) uzas la terminon "formato" pli vaste. Por eviti la

diskutojn, oni povus ekzemple uzi PDF kaj Word kiel adjektivojn kaj skribi "PDF-a [podofoa] dosiero". Ĉiu leganto komprenos ĉu "dosiero en PDF-a formo", ĉu dosiero en "PDF-a formato", ĉu dosiero de tipo PDF.

Cut and paste

La tuta metaforo pri "eltondi" kaj "alglui", kiel uzita en komputilaj aplikaĵoj, venas de la antaŭa preparado de ĵurnaloj kaj revuoj, kie oni vere eltondis vortojn aŭ alineojn (t.e. oni tranĉis paperon per tondilo por elpreni kelkajn vortojn). Por aldoni vortojn, oni algluis paperon kun tajpitaĵoj sur ĝi. Kiam oni ekuzis komputilojn por enpaĝigi tekstojn, oni nature reuzis la samajn vortojn por la sama operacio, kvankam oni ne plu uzis veran tondilon aŭ gluon. Poste, kreantoj de komputilaj programoj plilarĝigis la sencon de tiuj vortoj, kaj nun eblas "eltondi" pli malpli ion ajn el unu aplikaĵo kaj "alglui" ĝin en alian, ĉu foto, ĉu teksto, ĉu datumoj, ktp.

Pixel

Iuj opinias, ke "bildero" estus pli bona traduko, ĉar pli simpla. Jes, ĝi estas pli simpla, sed ankaŭ malpli ĝusta: ja ne temas pri ero de la bildo mem, sed pri ero de ties rastrumigita prezento; unu sama bildo povas havi diversajn rastrumigojn (ĉe diversaj distingivoj) — kaj aliflanke, oni povas paroli pri "rastrumo" sendepende je bildo (samkiel eblas paroli pri ekrano sendepende je bildo). [Sergio Pokrovskij]

Tipo / speco

Atentu pri la difereco inter "tipo" laŭ "speco" en Esperanto. En multaj esprimoj "type" estas tradukita per "tipo", sed tio estas falsa amiko; plej ofte "type" estas "speco". Bona ekzemplo estas "tipara tipo" por "font type". "Tiparo" estas aro da tipoj, do "tipara tipo" pensigas pri unu el tiuj tipoj kaj ne pri "speco de tiparo". Speco estas pli vasta kaj tipo pli detala. Do dosierspecoj estas bildoj, tekstoj, ... kaj dosiertipoj estas JPG, BMP, PNG, TXT, DOC. Datumspeco estas numero kaj -tipo estas INT, LONG, DOUBLE, VARCHAR, NUMBER(12,4). [Edmund Grimley Evans]

Retadreso

En praktiko oni uzas "retadreson" kiel tradukon de "URL" kaj de "e-mail address". Se vi volas esti pli klara, eblas uzi "reteja adreso" por URL kaj "retpoŝta adreso" por "e-mail address".

Neologismoj, nenecesajoj kaj oftaj eraroj

Estas tendenco provi limigi sin al Fundamentaj kaj oficialaj radikoj. Mi plene subtenas tiun filozofion! Jen listeto kun terminoj kiujn mi malkonsilas uzi. Mi aldonis alternativan tradukon.

- alkroĉaĵo = aldonaĵo, kunsendaĵo
- amplifiki = amplifi
- amplifikatoro = amplifilo
- asemblero = asemblilo
- budĝeto = buĝeto
- datenoj = datumoj
- datenbazo = datumbazo
- diĝita, diĝitala = cifereca
- emajlo = retpoŝto, retmesaĝo
- fajlo = dosiero
- hakero = kodumulo
- hardvaro = aparataro
- informacio = informo
- karaktero = signo
- komputero = komputilo
- licenco = permesilo
- paragrafo = alineo
- softvaro = programaro
- storo = memoro, memorilo
- stori = enmemorigi
- savi = konservi
- uzula = de uzanto
- versiono = versio

La terminokolekto

La usonangla estas la fontolingvo de la Komputeko-projekto. Tiuj terminoj aperas grase. Ĉar en la angla ne ĉiam estas klare ĉu vorto estas verbo, ĉu substantivo, ĉu adverbo/adjektivo, mi indikis post la termino inter krampoj pri kiu vortklaso temas.

v = verbo

s = substantivo

a = adverbo aŭ adjektivo

m = mallongigo

La traduko menciita tuj post la egalsigno (=) estas tiu kiun mi preferas. Por ĉirkaŭ sepono de la terminoj, post la vertikala streko (|) aperas alternativa traduko. Inter krampoj aperas la fontindikoj. Klarigojn vi trovos en paĝo 8.

Foje mi longe diskutis antaŭ ol veni al konkludo. Mi invitas vin provlegi la tutan liston kaj informi min pri plibonigeblaĵoj!

A

abacus (s) = abako (Bertin)
abandon (v) = forlasi
abbreviate (v) = mallongigi
abbreviation (s) = mallongigo
abend (m) = misfino (PIV2002, KompLeks)
ability (s) = eblo (Maŭro) | ebleco
abnormal ending (s) = misfino
abort (v) = ĉesigi (KompLeks, OOo, KDE)
about (s) = pri
about box (s) = pri-dialogujo
absolute (a) = absoluta (KompLeks) | senkondiĉa (TekVort)
absolute address (s) = absoluta adreso (KompLeks, Pekoteko)
absolute cell reference (s) = absoluta ĉelreferenco
absolute coding (s) = absoluta kodado
absolute link (s) = absoluta ligilo
absolute path (s) = absoluta vojo
absolute URL (s) = absoluta URL
absolute value (s) = absoluta valoro
abstract (s) = resumo (OOo)
abstract (a) = abstrakta (Bertin)
abstract machine (s) = abstrakta maŝino
abstract syntax (s) = abstrakta sintakso
abstract syntax tree (s) = abstrakta sintaksarbo
abuse (s) = misuzo | fiuzo (Maŭro)
abuse (v) = misuzi | fiuzi (Maŭro)
accelerate (v) = plirapidigi
acceleration (s) = plirapidigo
accelerator (card) (s) = plirapidigilo
accelerator board (s) = plirapidigilo
accelerator card (s) = plirapidigilo
accent (s) = kromsigno (Benson) | diakrita signo (PIV1)
accent key (s) = kromsigna klavo | senpaŝa klavo (KompLeks)
acceptable use policy (s) = politiko pri akceptebla uzado (Edmundo)
acceptance criteria (s) = kriterioj por akceptado
acceptance testing (s) = testo de akceptado
access (s) = atingo (KompLeks, ReVo, OOo) | aliro (Bertin)
access (database) (v) = atingi (PIV2002, OOo) | aliri (KompVort)
access (disk) (v) = atingi (PIV2002) | aliri
access code (s) = atingokodo | alirokodo
access control (s) = atingokontrolo (KompLeks, TekVort) | alirokontrolo
access error (s) = atingeraro (OOo) | aliroeraro
access key (s) = fulmoklavo (Plone)
access level (s) = atingonivelo
access mask (s) = atingomasko

access mechanism (s) = atingomekanismo
access method (s) = atingomaniero (KompLeks, TekVort) | alirometodo
access number (s) = atingonumero
access permission (s) = atingopermeso (TekVort, KDE)
access point (s) = retkaptejo
access provider (s) = interretperanto (FEL) | provizanto de retkonekto (KompLeks)
access rate (s) = atingorapido
access right (s) = atingorajto (KompLeks, TekVort)
access time (s) = atingotempo (KompLeks, TekVort, KDE)
access token (s) = atingoĵetono
access violation (s) = atinga malobservo
accessibility (s) = alirebleco (Edmundo, Firefox)
accessibility aids (s) = iloj por alirebleco
accessibility feature (s) = ilo por alirebleco | faciluzilo (KDE)
accessibility tool (s) = ilo por alirebleco (KDE)
accessibility wizard (s) = asistanto pri alirebleco
accessories (s) = akcesoraĵoj (TekVort)
account (customer) (s) = kliento
account (data) (s) = konto (KompLeks, ReVo)
account alias (s) = kromnomo de konto
account expiration (s) = konta ekvalidiĝo
account information (s) = kontaj informoj
account lockout (s) = konta ŝlosa
accumulator (s) = akumululejo (PIV2002, ReVo) | akumulatoro (Bertin)
accuracy (s) = ekzakto (KDE) | ekzakteco (KompLeks)
accurate (a) = ekzakta
acknowledge (v) = kvitanci (KompLeks) | konfirmi
acknowledge character (s) = kvitanca signo (KompLeks, Bertin) | konfirma signo
acknowledgement (s) = konfirmo
ACL policy (s) = alirkrollista sekureca strategio (Denizo)
acquire (v) = akiri (Bertin, TekVort)
acquisition (s) = akiro (Bertin)
acquisition date (s) = akirdato
acronym (s) = akronimo (Vikipedio)
action (s) = ago
action bar (s) = agobreto | agotrabo
action button (s) = agobutono
action page (s) = agopaĝo
action query (s) = aktiva informpeto
action row (s) = rikordo
action statement (s) = ag-ordono (Maŭro)
action table (s) = rikordaro
action type (s) = agospeco
activate (v) = aktivigi (Bertin, KDE) | ŝalti (OOo)

activation (s) = aktivigo (Bertin)
active (a) = aktiva
active cell (s) = aktiva ĉelo
active content (s) = aktiva enhavo
active control (s) = aktiva stirilo
active desktop (s) = aktiva labortablo
active directory (s) = aktiva dosierujo
active document (s) = aktiva dokumento
active link (s) = aktiva ligilo (OOo)
active partition (s) = aktiva subdisko
active script (s) = aktiva skripto
Active Server Pages (s) = Aktivaj Servil-Paĝoj
active sheet (s) = aktiva folio
active window (s) = aktiva fenestro (OOo)
ActiveX component (s) = ActiveX-elemento
ActiveX control (s) = ActiveX-stirilo
ActiveX Data Objects (s) = ActiveX-datumbjektaj
ActiveX object (s) = ActiveX-objekto
actual address (s) = fakta adreso (Bertin)
ad (s) = reklamo (Edmundo)
ad blocker (s) = reklamoblokilo
ad click (s) = alklako sur reklamo
ad click rate (s) = ofteco de alklakado sur reklamo
ad display (s) = reklamoaperigo
ad hoc network (s) = porokaza loka reto (Edmundo)
ad hoc query (s) = dinamika informpeto
ad killer (s) = reklamoforigilo
ad window (s) = reklamofenestro
adapt (v) = adapti
adapter (s) = adaptilo (KompLeks, Bertin, TekVort)
adapter card (s) = adaptila karto
adapter framework (s) = adaptila framo
adaptive format (s) = adaptiĝa aranĝo
add (v) = aldoni
added value (s) = aldona valoro
addendum (s) = aldono
adder (s) = adiciilo (Bertin)
add-in (a) = kromprogramo (Firefox) | aldonaĵo (OOo)
addition (s) = adicio (Bertin)
additional display (s) = kroma ekrano
add-on (a) = aldonaĵo | helpprogramo
add-on device (s) = kroma aparato
address (s) = adreso (PIV2002, ReVo, Bertin)
address (v) = adresi
address assignment (s) = adresatribuo (TekVort)
address bar (s) = adresbreto
address book (s) = adresaro (OOo, KDE, FEL)
address bus (s) = adresbuso (KompLeks, Bertin, TekVort)
address field (s) = adreskampoj (OOo) | adresparto (KompLeks)
address list (s) = adresaro (TekVort)

address pool (s) = adresgrupo
address register (s) = adresreĝistro (TekVort)
address space (s) = adresospaco (TekVort)
address translation (s) = adrestraduko
addressee (s) = adresato (OOo, TekVort)
addressing (s) = adresado (Bertin)
adjacent (a) = najbara | apuda
adjust (v) = ĝustigi (Bertin) | akomodati (KompLeks)
adjustment (s) = ĝustigo (Bertin) | akomodigo
adjustment handle (s) = ĝustiga tenilo
adjustment layer (s) = ĝustiga tavolo | akomodata tavolo
administration (s) = administrado (TekVort)
administration queue (s) = administra atendovico (Maŭro)
administrative credentials (s) = administra legitimaĵo
administrative setup (s) = administra agordo
administrative tools (s) = administra ilaro
administrative vulnerability (s) = administra atakeblo (Maŭro)
administrator (s) = administranto (OOo)
administrator account (s) = konto de administranto
administrator role (s) = rolo de administranto
administer (v) = administri (Drupalo)
admission control (s) = atinga kontrolo
adoption rate (s) = alprena rapido
adornment (s) = grafika elemento
advance (increase) (v) = kreskigi (Bertin)
advance (move) (v) = movi (Bertin)
advanced (a) = speciala (OOo) | progresinta (Maŭro)
advanced filter (s) = speciala filtrilo (OOo)
advanced mapping (s) = speciala mapigo
advanced power management (s) = altnivela energiadministrado
advanced search (s) = detala serĉo (KDE)
advanced user (s) = spertulo
advertising banner (s) = reklamrubando (KompLeks)
advertising button (s) = reklambutono
adware (s) = reklamprogramaro (tradukado)
affiliation program (s) = partnera programo (Lode VDV)
affirmative response (s) = jeso (KompLeks)
aggregate (v) = kolekti (Chuck Smith) | kunmetita (Lode VDV)
aid (s) = helpo (Bertin) | konsilo (Bertin)
aim (v) = celi
air conditioning (s) = klimatizilo | klimatizado (Bertin)
air vent (s) = aerklapo (Lode VDV)
airbrush (s) = ŝprucpisto (OOo)
alert (v) = averti | pepi
alert (s) = averto | pepo (TekVort)
alert box (s) = averta fenestro

alert message (s) = averta mesaĝo
algorithm (s) = algoritmo (PIV2002, KompLeks, ReVo)
algorithmic (a) = algoritma (Bertin)
alias (link to file) (s) = simbola ligilo (KompLeks)
alias (person) (s) = kromnomo (KompLeks)
aliasing (s) = kromnomado
align (v) = ĝisrandigi (OOo) | rektigi (PIV2002)
align bottom (s) = ĝisrandigi malsupren (OOo)
align center (s) = centrigo (Maŭro)
align center horizontally (s) = horizontala centrigo (Maŭro)
align center vertically (s) = vertikala centrigo (Maŭro)
align centered (s) = centrigo (Maŭro)
align left (s) = ĝisrandigi maldekstren (OOo)
align middle (s) = centrigo (Maŭro)
align right (s) = ĝisrandigi dekstren (OOo)
align to grid (s) = alkradigi (Maŭro)
align to top (s) = ĝisrandigi supren (OOo)
alignment (s) = ĝisrandigo (TekVort)
all caps (s) = nur majuskloj
all-in-one (a) = ĉio-en-unu
allocate (v) = asigni (PIV2002, Edmundo)
allocation (s) = asigno (PIV2002)
allocation unit (s) = asigna unuo
allow (v) = permesi (OOo, Abiword)
alpha (a) = alfa
alpha release (s) = alfa eldono
alpha version (s) = alfa versio
alphabetic (a) = alfabeto (Bertin)
alphanumeric (a) = litercifera (PIV2002, KompLeks, OOo) | alfanumera (Pekoteko)
Alt key (s) = Alt-klavo (KDE) | alternativa registruo (KompLeks)
alter (v) = modifi (Bertin) | ŝanĝiĝi (TekVort)
alteration (s) = modifo (Bertin)
alternate (v) = alterni (TekVort)
alternate current (s) = alterna kurento (Bertin)
alternating (a) = alterna (Bertin, TekVort)
alternating group (s) = alterna grupo (TekVort)
always on top (a) = ĉiamvidebligi (Maŭro)
ambiguity (s) = plursenceco
ambiguous (a) = plursenca (KompLeks) | ambigua (KompLeks)
amount (s) = sumo (Bertin)
ampersand (s) = kaj-signo (ReVo, Pekoteko) | perlueto (KompLeks)
amplification (s) = amplifo (PIV2002)
amplifier (s) = amplifilo (PIV2002, Bertin)
amplify (v) = amplifi (PIV2002)
analog (a) = analoga (PIV2002, KompLeks, Bertin)
analog-to-digital converter (s) = ciferecigilo (KompLeks)
analysis (s) = analizo (Bertin)
analyst (s) = analizisto (Bertin)

analytic (a) = analiza (Lode VDV)
analyzer (s) = analizilo (KompLeks, ReVo, Bertin)
ancestor (s) = praulo
ancestor element (s) = praula elemento (Edmundo)
anchor (s) = ankro (KompLeks, OOo, FEL)
anchor cell (s) = ankra ĉelo
anchor plugin (s) = ankra kromprogramo
anchor point (s) = ankra punkto
anchor window (s) = ankra fenestro
ancillary (a) = helpa (Bertin)
angle brackets (s) = angulaj krampoj
animated advertisement (s) = movbilda anonco
animated button (s) = movbutono
animated GIF (s) = GIF-movbildo
animated image (s) = movbildo
animation (s) = movbildo | animacio (ReVo)
annotate (v) = prunti (NL-EO 4) | komenti
annotation (s) = prunto (NL-EO 4) | komento (Bertin)
anomaly (s) = nenormalaĵo (Bertin)
anonymous (a) = sennoma | anonima
anonymous FTP (s) = sennoma FTP | anonima FTP (KompLeks)
anonymous FTP authentication (s) = sennoma FTP-aŭtentigo
anonymous logon (s) = sennoma ensaluto | senrekona ensaluto (Maŭro)
anonymous user (s) = sennoma uzanto
anonymous user access (s) = atingo de sennoma uzanto
ANSI character set (s) = ANSI-signaro
answer file (s) = respondodosiero
answering tool (s) = respondilo
anti spam (s) = kontraŭspamilo
anti-aliasing (s) = glatigo (KompLeks, KDE)
anti-piracy system (s) = kontraŭpirata sistemo
antivirus program (s) = senvirusigilo
antivirus software (s) = senvirusigilo (KompLeks, TekVort)
anycast (v) = ien-ajn-elsendi
aperture (s) = aperturo (Bertin)
API (m) = API
apostrophe (s) = apostrofo (KompLeks)
appealing (a) = alloga
appearance (s) = apero (KompLeks, ReVo) | aspekto (Maŭro)
append (v) = postglui (OOo) | postaldoni (Vim)
append query (s) = aldoniga informmendo
appendable (a) = postgluebla | postaldonebla
Apple hardware (s) = Apple-aparataro
Apple platform (s) = Apple-platformo
Apple software (s) = Apple-programaro
applet (s) = retprogramo (KompList) | apleto (KompLeks)
appliance (s) = aparato

appliance server (s) = servila fasko
application (s) = aplikaĵo (KompLeks, KDE, TekVort) | aplika programo (PIV2002)
application designer tool (s) = programilo (Maŭro) | komponilo (KompLeks)
application domain (s) = aplikokampo
application folder (s) = programdosierujo
application launcher (s) = aplikaĵolancilo (KDE)
application layer (s) = aplika tavolo (TekVort)
application logic (s) = logiko de la aplikaĵo
application pane (s) = aplikaĵofenestro
application pool (s) = grupo de aplikaĵoj
application program (s) = aplika programo (PIV2002, Bertin)
Application Programming Interface (s) = aplikprograma interfaco (KompLeks)
application root (s) = aplikaĵa radiko
application scope (s) = aplikaĵa regiono
application server pages (s) = servilaplikaj paĝoj
application settings (s) = agordoj de aplikaĵo
application sharing (s) = komunigo de aplikaĵo
application software (s) = aplika programaro (ReVo)
Application Specific Integrated Circuit (ASIC) (s) = Aplikadospecifa Integrita Cirkvito (ASIC) (KompList)
application suite (s) = aplikaĵaro
apply (v) = apliki (OOo) | kandidatiĝi (Drupalo)
apply power to (v) = kurentprovizi (Bertin)
approach (s) = aliro (KompLeks)
approval history (s) = historio de aproboj
arbitrary (a) = arbitra (Pekoteko)
arc (s) = arko (Bertin)
architecture (s) = arkitekturo | arĥitekturo
archive (v) = enarkivigi (KompList)
archive (s) = arkivo (PIV2002, KompLeks) | arĥivo (PIV2002)
archiving (s) = arkivado (TekVort)
archiving software (s) = arkiva programaro
area (s) = zono (Bertin)
area chart (s) = area diagramo (Maŭro)
area code (s) = regionkodo
argument (s) = argumento (KompLeks, Bertin)
arithmetic (a) = aritmetika (Bertin)
arithmetic and logical unit (s) = aritmetikilo (ReVo)
arithmetics (s) = aritmetiko (ReVo)
arm (access) (s) = brako (Bertin)
arrange (v) = aranĝi (OOo)
array (s) = tabelo (KompLeks, OOo, Bertin) | matrico (Maŭro)
array type (s) = tabeltipo | matricotipo (Maŭro)
arrow (s) = sago (OOo, Pekoteko)
arrow key (s) = sagoklavo (TekVort, KompLeks)
art department (s) = grafikistoj
article (website) (s) = artikolo
artificial intelligence (s) = artefarita intelekto (PIV2002, ReVo, KompList)

artificial language (s) = artefarita lingvo (Bertin)
artwork (s) = artaĵoj | grafiko
ascend (v) = kreski (OOo, Lode VDV)
ascender (s) = superliniaĵo (KompLeks)
ascending (a) = kreska (OOo, TekVort)
ascending order (s) = kreska ordo (KompLeks, Bertin)
ascending sort (s) = kreska ordigo (KompLeks)
ASCII (s) = askio (PIV2002, ReVo, TekVort)
ASCII character set (s) = askia signaro (PIV2002, KompLeks)
ASCIIize (v) = askiigi (ReVo)
ASP (m) = ASP
aspect ratio (s) = ekranformato (Edmundo) | bildformato (Edmundo)
assemble (hardware) (v) = munti
assemble (programming) (v) = asembli (PIV2002, ReVo, Bertin) | kunmeti (Teknika vortaro)
assembler (s) = asemblilo (PIV2002, KompLeks, Bertin) | kunmetilo (Teknika vortaro)
assembly language (s) = asembla lingvo (PIV2002, TekVort, KompList)
assertion (s) = aserto (KompLeks)
asses (v) = taksi (Benson)
assessment (s) = takso (Benson)
asset (s) = pluso (Lode VDV)
assign (v) = atribui (OOo)
assigned configuration (s) = atribuita agordo
assigned task (s) = atribuita tasko
assignment (s) = atribuo (KompBaz)
assignment operator (s) = atribuilto
assignment statement (s) = atribua instrukcio
assistant (installation) (s) = instal-asistanto | agordilo (KDE)
assistive technologie (s) = helpoteknologio (Cindio)
associate (v) = asocii (Edmundo)
associated item (s) = asociita elemento
association (s) = asocio (Drupalo)
associative array (s) = akompana tabelo
assumption (s) = supozo
asterisk (s) = steleto (KompLeks, TekVort)
asymmetric (a) = malsimetria (KompLeks, TekVort)
asymmetric encryption (s) = malsimetria ĉifrado
asymmetric key algorithm (s) = malsimetria ŝlosiloalgoritmo
asymmetric multiprocessing (s) = malsimetria plurtraktado
asynchronous (a) = nesinkrona (KompLeks, TekVort)
asynchronous communication (s) = nesinkrona komunikado
asynchronous data exchange (s) = nesinkrona interŝanĝo de datumoj

asynchronous operation (s) = nesinkrona funkciado
asynchronous transfer mode (s) = nesinkrona transmadata reĝimo
at random (a) = aleatore (KompLeks, KompList) | hazarde (Maŭro)
at sign (s) = heliko (PIV2002, KompLeks, ReVo) | po-signo (ReVo)
attach (v) = kunligi | alkröci (Maŭro)
attached event (s) = ligita evento
attached property (s) = ligita eco
attachment (s) = kunsendaĵo (KompLeks, ReVo, TekVort) | aldonaĵo (FEL)
attendance (s) = ĉeesto (Bertin)
attribute (symbol) (s) = atributo (KompLeks, ReVo, KompList)
attribute (belonging to) (s) = atribuo
attribute (v) = atribui
audio (a) = son-
audio book (s) = sonlibro
audio CD (s) = sondisko
audio codec (s) = sonkodeko
audio conference (s) = sontelego (Bertin)
audio editor (s) = sonredaktilo (KDE)
audio file (s) = sondosiero (TekVort)
audio mixer (s) = sonmiksilo (Maŭro)
audio preview (s) = antaŭaŭskulto (KDE)
audio recorder (s) = sonregistrilo (KDE)
audiographic (a) = sonbilda (Bertin)
audio-visual (a) = aŭdvida
audit (v) = ekzameni (Edmundo) | revizii (Bertin)
audit mode (s) = ekzamena reĝimo | revizia reĝimo
audit policy (s) = ekzamena strategio | revizia strategio
auditor (s) = ekzamenisto | reviziisto (Bertin)
authentic (a) = aŭtenta (Lode VDV) | aŭtenta
authenticated (a) = aŭtentigita
authenticated access (s) = aŭtentigita aliro
authentication (s) = aŭtentokontrolo (KompLeks, Ipernity, TekVort)
authentication database (s) = aŭtentiga datumbazo
authentication method (s) = aŭtentiga metodo
authentication server (s) = aŭtentiga servilo (Drupalo)
authentication service (s) = aŭtentiga servo (Drupalo)
authentication (s) = aŭtentokontrolo (KompLeks, TekVort)
authentication code (s) = aŭtentoidiko (KompLeks, TekVort)
authored (a) = verkita (Drupalo)
authoring tool (s) = verkilo (Lode VDV)
authorization (s) = rajtigo (Wordpress)
authorization manager (s) = rajtoadministrado

authorize (v) = rajtigi (Wordpress)
authorized (a) = rajtigita
authorized distributor (s) = rajtigita distribuanto
authorized user (s) = rajtigita uzanto
auto start (s) = aŭtolanĉo (KDE) | memlanĉo (Maŭro)
auto thumbnail (s) = aŭtominiaturo
auto-adjust (v) = aŭtomate sinadapti | memadaptiĝi (Maŭro)
autoarchive (v) = aŭtomate enarkivigi
auto-complete (v) = aŭtomate kompletigi (Drupalo)
autoconnect (v) = aŭtomate konektiĝi
auto-correct (v) = aŭtomate korekti (OOo) | memkorekti (Bertin)
autodecrement (s) = memdekremento (KompLeks)
autodetection (s) = aŭtomata rekono (Lode VDV)
auto-dialer (s) = aŭtomata numerumilo
auto-exit (v) = aŭtomate eliri
autofit (selection) (s) = aŭtomate adapti
autoflow (s) = aŭtomata pluflo (Lode VDV)
auto-format (s) = aŭtomate formati (OOo)
autohide (s) = aŭtomata malaperi (Lode VDV)
autoincrement (s) = memalkremento (KompLeks, TekVort)
auto-joining (s) = aŭtomata kunligado
autolayout (s) = aŭtomata enpaĝigo
autologger (s) = aŭtomata protokolilo
autologon (s) = aŭtomata ensaluto
automatic (a) = aŭtomata (Bertin)
automatic configuration (s) = aŭtomata agordo
automatic document feeder (s) = aŭtomata paperenmetilo
automatic failover (s) = aŭtomata ŝanĝo al rezerva sistemo
automatic layout (s) = aŭtomata enpaĝigo
automatic learning (s) = aŭtomata lernado
automatic login (s) = aŭtomata ensaluto (KDE)
automatic reply (s) = aŭtomata respondo
automatic scrolling (s) = aŭtomata rulumado
automatic update (s) = aŭtomata ĝisdatigo | aŭtomata aktualigo (Maŭro)
automation (s) = aŭtomatigo (Bertin)
automatize (v) = aŭtomatigi (Bertin)
autonomous (a) = memstara | aŭtonoma (Bertin)
autonomous system (s) = memstara sistemo (Maŭro) | aŭtonoma sistemo
autopilot (s) = aŭtomata piloto (OOo)
auto-play (s) = aŭtomate ludi | memstarto (Maŭro)
auto-recover (s) = aŭtomata restaŭro
autorecover info (s) = aŭtomataj riparinformoj (Lode VDV)

auto-repeat (s) = aŭtomata ripeto
auto-report (s) = aŭtomata raporto
autoresponder (s) = aŭtomata respondilo
auto-response (s) = aŭtomata respondo
autorun (s) = aŭtomata lanĉo
autosave (s) = aŭtokonservado (KompLeks, TekVort)
auto-static update (s) = aŭtomata statika ĝisdatigo | aŭtomata statika aktualigo (Maŭro)
autostretch (s) = aŭtomate streĉi
autosum (s) = aŭtomata sumo
autotext (s) = aŭtomata teksto (OOo)
auto-throttle (s) = aŭtomata trafik-limigo (Drupalo)
autoverify (v) = memkontroli (Bertin)
autowrap (s) = aŭtomata linifaldado (Maŭro) | aŭtomata teksta ĉirkaŭfluo
auxiliary (a) = neĉefa (Bertin) | helpa (Bertin)
auxiliary display (s) = neĉefa ekranaro
auxiliary equipment (s) = neĉefa ekipaĵo | helpaparataro (Lode VDV)
auxiliary memory (s) = neĉefa memoro (Bertin, Pekoteko) | helpmemoro (Lode VDV)
availability (a) = disponeblo (Bertin)
availability indicator (s) = indikilo pri disponeblo
available (a) = disponebla (KompLeks, OOo, Abiword) | disponata (Edmundo)
available disk space (s) = disponebla diskospaco (OOo)
available memory (s) = disponebla memoro
avatar (s) = avataro (Chuck Smith)
award (s) = premio
axis (s) = akso (OOo, Bertin)
B2B integration (s) = interkomerca integriro
back buffer (s) = akcesora bufro
back panel (s) = malantaŭa panelo
backbone (s) = spino (KompLeks, FEL) | ĉefreto (KompLeks)
backbone router (s) = ĉefa enkursigilo
back-end (a) = interna | administra
back-end interface (s) = interna interfaco (KompLeks) | administra interfaco (Maŭro)
background (s) = fono (KompLeks, ReVo, OOo)
background (a) = fona
background color (s) = fona koloro
background graphics (s) = fona grafiko
background handles (s) = fonaj teniloj
background process (s) = fona procezo (KompLeks, TekVort)
background processing (s) = fona reĝimo (ReVo)
background program (s) = fona programo
background shading (s) = fona ombro
background sound (s) = fona sono
background task (s) = fona tasko (KompLeks, TekVort)
backing store (s) = ekstera memorilo

backlight (s) = fona lumo
back-office (s) = administrejo (Maŭro)
backorder (s) = retromendo
backplane (s) = alkonecta cirkvirkarto
backslash (s) = malsuprenstreko (Bertilo) | dekliva streketo (KompLeks)
backspace (s) = retropaŝo (KompLeks, TekVort, OOo)
backspace key (s) = retropaŝa klavo
backtrace (s) = retrospurado (KDE)
backup (s) = savkopio (ReVo, Edmundo) | restaŭrkopio (KompLeks)
backup (v) = fari savkopion | enarkivigi (KompVort)
back-up (a) = savkopio | restaŭra (Bertin)
back-up copy (s) = savkopio (ReVo, Edmundo) | restaŭrkopio (Bertin)
back-up cycle (s) = savciklo
back-up file (s) = savdosiero | restaŭrdosiero (OOo)
back-up server (s) = rezerva servilo (Edmundo)
back-up store (s) = ekstra memoro
backward compatibility (s) = retrokongruo
backward compatible (s) = retrokongrua
backward quote (s) = malapostrofo (PIV2002, Edmundo) | retrocilito (Vim)
backward slash (s) = malsuprenstreko (Bertilo) | dekliva streketo (KompLeks)
bad block (s) = malbona sektoro
bad sector (s) = malbona sektoro
badge (s) = insigno (Bertin)
balloon help (s) = ŝpruĉhelpilo (KompLeks)
balloon tip (s) = ŝpruĉhelpa konsilo
ban (visitor from site) (v) = forbari (Vikipedio, Drupalo)
band (s) = bendo (Bertin)
banded (a) = rubanda
bandwidth (s) = kapacito (KompLeks, KDE) | bendlarĝo (Teknika vortaro)
bandwidth throttling (s) = limigado de kapacito
bang (UNIX) (s) = krisigno
banner (s) = reklamrubando (KompLeks) | ligbutono (E@I)
bar (s) = breto (OOo) | trabo (KompLeks)
bar (planning software) (s) = bastono
bar (stroke) (s) = streko (Bertin)
bar chart (s) = bastona diagramo (KDE) | ortogramo (Maŭro)
bar code (s) = strikodo (PIV2002, Edmundo) | strekokodo (Bertin)
bar code reader (s) = strikodolegilo (PIV2002)
bar code scanner (s) = strikoda skanilo
bar graph (s) = bastona diagramo | ortogramo (Maŭro)
bar width (s) = bretolarĝo (OOo)
base (s) = bazo (Bertin)

base address (s) = bazadreso (Bertin)
base address register (s) = bazadresa reĝistro
base backup (s) = baza savkopio | baza sekurkopio
base capacity (s) = baza kapacito
base character (s) = baza signo
base language (s) = baza lingvo
base memory (s) = baza memoro
base style (s) = baza stilo
base unit (s) = baza unuo
baseline (s) = bazolinio
bash (s) = Baŝo (KompLeks)
Basic (s) = Baziko (PIV2002)
basic input/output system (s) = BIOS
basic signal (s) = baza signalo (Bertin)
basic storage (s) = baza konservado
basic volume (s) = baza portilo
basket (s) = ĉareto (Ipernity) | korbo
batch file (s) = komandosdosiero (KompList) | komandaro (KompVort)
batch processing (s) = stapla reĝimo (KompLeks) | fona reĝimo (KompLeks)
batch program (s) = komandosdosiero
batch-printing (s) = stapla presado | stapla printado
battery (s) = baterio | akumulatoro (Edmundo)
battery charge (s) = ŝargeco de la baterio (Maŭro)
battery charger (s) = bateria ŝargilo
battery life (s) = bateria vivdaŭro
battery management (s) = bateria mastrumado
battery runtime (s) = bateria vivdaŭro
battery supply (s) = bateria nutr(ad)o
baud (s) = baŭdo (Bertin, KompList, FEL)
baudrate (s) = transmetrapido (en baŭdoj) (KompLeks, TekVort)
beep (v) = pepi
beep (s) = pepo
bell (s) = pepo (KDE)
benchmark (s) = taksotestado
benchmark program (s) = taksotestilo
benchmarking (s) = taksotestado (KompLeks) | kompara kvalitprovo (KompBaz)
beta (a) = beta (KompLeks)
beta release (s) = beta-eldono
bevel (s) = bevelo (ReVo) | klintranĉita rando (ReVo)
bevel (v) = beveli (ReVo) | klintranĉi (ReVo)
bezel (s) = nigra rando (Lode VDV)
Bezier curve (s) = Bezier-kurbo
Bezier surface (s) = Bezier-surfaco
bias (s) = ekarto (Bertin)
bias error (s) = ekarteraro (Bertin)
bidirectional (a) = ambaŭdirekta
bifurcation (s) = disforkiĝo
big-endian (a) = pezkomenca
bilinear (a) = dulinara

bilinear filtering (s) = dulinara filtrado
bilingual glossary (s) = dulingva difinvortaro
bill (s) = fakturo (Bertin)
bill (v) = fakturi (Bertin)
billing address (s) = adreso por la fakturo
bin (s) = ujo
binary (a) = duuma (PIV2002, KompLeks, ReVo) | binara (PIV2002)
binary code (s) = duuma kodo (KompLeks, TekVort, Bertin) | binara kodo (KompVort)
binary digit (s) = duuma cifero
binary file (s) = duuma dosiero (KompLeks, KompList, FEL) | binara dosiero
binary tree (s) = duuma arbo (TekVort) | binara arbo
bind (v) = bindi (PIV2002, ReVo)
bind to port (v) = asocii sin kun pordo
binder (s) = bindilo (ReVo)
binding (s) = bindaĵo (OOo)
binding expression (s) = bindaĵa esprimo (OOo)
binding margin (s) = binda marĝeno
BIOS (m) = BIOS
bistable (a) = dustabila (Bertin)
bit (s) = bito (PIV2002, KompLeks, ReVo)
bit map (s) = rastrumo (KompLeks, OOo, KDE) | bitbildo (PIV2002)
bit rate (s) = bitrapido (Bertin)
bit stream (s) = bitfluo (Bertin)
bit string (s) = bitĉeno (KompLeks)
bitmap font (s) = rastruma tiparo (TekVort) | bildera tiparo (Maŭro)
bitmap pattern (s) = rastruma motivo (OOo) | bildera motivo (Maŭro)
bitmap scaling (s) = rastruma skalado | bildera skalado (Maŭro)
bits per pixel (s) = bitoj rastrumere | bitoj bildere (Maŭro)
bits per second (s) = bitoj en sekundo | bitoj sekunde (Maŭro)
BitTorrent (s) = samtavola dosierdivida protokolo
bitwise comparison (s) = laŭbita kompara operacio
black and white (a) = nigra-blanka (OOo)
black box (s) = nigra skatolo (Bertin)
black hat (s) = retpirato (ReVo)
blacklist (v) = listigi je nigra listo
blacklist (s) = nigra listo
blacklisted (a) = listigita je nigra listo
blank (v) = viŝi (Bertin) | plenigi per spacetoj (Bertin)
blank (s) = malplena (Drupalo)
blank character (s) = spaceto
blank line (s) = malplena linio (OOo, Bertin)
blank screen (s) = malplena ekrano (Lode VDV)
blind carbon copy (s) = kaŝkopio (Maŭro) | kaŝita kopio (OOo)

blink (v) = pulsi (KompLeks, OOo) | lumpulsi (ReVo)
blink time (s) = pulsrapido
blinking (a) = pulsa (OOo)
blinking (s) = pulsado (KompLeks, OOo) | lumpulsado (ReVo)
block (transitive) (v) = bloki (Bertin, Drupalo) | forbari (Drupalo)
block (intransitive) (v) = blokiĝi
block (s) = bloko (ReVo, Bertin)
block (group) (v) = grupigi (Bertin)
block diagram (s) = blokoskemo (Bertin)
blocking factor (s) = grupadfaktoro (Bertin)
blog (v) = blogi (ReVo)
blog (s) = blogo (KompLeks, ReVo) | retotaglibro
blog entry (s) = blogoskribaĵo | blog-enskribo (Drupalo)
blogger (s) = bloganto | verkanto de retotaglibroj
blower (s) = blovilo (Bertin) | malvarmigilo
blueprint (s) = plano
Bluetooth (s) = Bludento (Edmundo, Vikipedio)
Bluetooth adapter (s) = bludenta adaptilo
blurry (a) = malklara | nebula
blurry image (s) = malklara bildo | nebula bildo
board (s) = tabulo (Bertin) | panelo (Bertin)
body (message) (s) = korpo (KompLeks, OOo, TekVort)
body text (s) = teksta korpo
boilerplate text (s) = reuzebla teksto
bold (a) = grasa (OOo, Pekoteko, TekVort) | dika (Maŭro)
bold key (s) = grasiga klavo (Pekoteko) | dikiga klavo (Maŭro)
bolded (a) = grasigita | dikigita (Maŭro)
boldface (a) = grasa tiparfasono (KompLeks, TekVort) | dika tiparfasono (Maŭro)
bookkeeping (s) = librotenado (Bertin)
booklet (s) = libreto
bookmark (s) = legosigno (KompLeks, OOo, KompList) | paĝosigno (Firefox)
boolean (a) = bulea (PIV2002, KompLeks, Pekoteko)
Boolean data type (s) = bulea datumtipo
boolean expression (s) = bulea esprimo (KompLeks, TekVort)
Boolean operator (s) = bulea operacio
Boolean search (s) = bulea serĉo
boolean value (s) = bulea valoro (OOo)
boost (s) = plirapidigo (Drupalo)
boot (v) = praŝargi (KompLeks) | praŝargi (KompLeks)
boot disk (s) = praŝarga disko
boot drive (s) = praŝarga disko
boot file (s) = praŝarga dosiero
boot loader (s) = praŝargilo
boot manager (s) = praŝarga administrilo (KDE)

boot partition (s) = praŝarga subdisko
boot record (s) = praŝarga rikordo
boot sector (s) = praŝarga sektoro
boot volume (s) = praŝargebla portilo
bootable (a) = praŝargebla
bootable CD (s) = praŝargebla KD | praŝargebla k-disko
bootstrap (s) = praŝargo | buctrapo (Bertin)
bootstrap (v) = praŝargi | buctrapi (Bertin)
bootstrap loader (s) = praŝargilo
border (s) = bordero (OOo)
bottleneck (s) = ŝtopiĝo (Lode VDV)
bottom (s) = malsupro (OOo)
bottom line (s) = esenco
bottom-to-top (a) = malsupre-supren (Drupalo)
bottom-up development (s) = desuba konstruado (KompLeks)
bottom-up parsing (s) = desuba analizo (KompLeks)
bounce (v) = resalti (OOo) | reveni
bounce keys (s) = prokrastaj klavoj (KDE)
bounce message (s) = neliverita mesaĝo
bounced mail (s) = reveninta retroŝto
bound (a) = ligita
bound (s) = limo
bound control (s) = ligita fenestraĵo
bound data (s) = ligitaj datumoj
bound item (s) = ligita ero
bound object frame (s) = kadro por ligita objekto
boundary (s) = limo (OOo)
bounded (a) = limigita | barita (KompLeks)
bounding box (s) = limiga kasto
box model (s) = kadroaranĝo
bps (s) = bitoj sekunde (Maŭro)
brace {} (s) = kuniga krampo (OOo)
bracket [] (s) = rekta krampo (Bertilo)
branch (s) = branĉigo (Maŭro)
branch (v) = krei branĉon
brand (s) = marko (OOo)
branding (s) = markado
breadcrumb navigation (s) = paĝnivela navigo
break (key) (s) = haltiga klavo
break (page) (s) = paĝosalto (OOo)
break (pause) (s) = paŭzo (Bertin)
break line (s) = elprenita montrilo
break mode (s) = kontrolo reĝimo
breakdown (s) = disigo (Lode VDV)
breakpoint (s) = paŭzpunkto (Bertin) | haltopunkto (OOo)
breakpoint halt (s) = paŭzpunkta halto (Bertin)
breakpoint instruction (s) = paŭzpunkta instrukcio (Bertin)
breve (s) = hoketo (OOo)
bridge (s) = ponto
bridged transaction (s) = kondukita transakcio
bridgehead server (s) = regiondistribua servilo

brightness (s) = brileco (OOo) | helo (Edmundo)
bring forward (v) = porti antaŭen (OOo)
bring to front (v) = porti malfonen (OOo)
broadband (a) = larĝkapacita | hejma (Edmundo)
broadband connection (s) = larĝkapacita konekto
broadband internet access (s) = larĝkapacita interreta konekto
broadband network (s) = larĝkapacita reto
broadcast (s) = elsendo
broadcast (v) = elsendi
broadcast address (s) = elsenda adreso
broadcast network (s) = elsendada reto
broadcast publishing point (s) = elsenda enhavovojo
broken line (s) = interrompita linio (OOo)
broken link (s) = nefunkcia ligilo
browse (for file) (v) = foliumi (PIV2002, ReVo, OOo) | esplori
browse (internet) (v) = retumi (ReVo) | krozi
browser (files) (s) = dosieresploro (Bertilo) | loka foliumilo
browser (internet) (s) = foliumilo (KompLeks, ReVo) | TTT-legilo (PIV2002)
brush (s) = peniko (OOo, Lode VDV)
brute force attack (s) = simpla komputada atako (Edmundo)
B-spline (s) = B-splajno (KompLeks, OOo)
bubble (s) = veziko | bobelo (Maŭro)
buddy list (s) = amikolisto
buffer (s) = bufro (PIV2002, KompLeks, ReVo)
buffer (v) = bufri
buffer control block (s) = bufra kontrolarejaĵo (Maŭro)
buffer overflow (s) = bufra troo
buffer overrun (s) = bufra troo
buffer store (s) = bufra memorilo
buffer underrun (s) = bufra maltroo
bug (s) = cimo (PIV2002, KompLeks, ReVo)
bug fix (s) = cimoriparo
bug report (s) = cimraporto
buggy (a) = cima
build (v) = kunmeti (Lode VDV) | fari
build (s) = kunmetaĵo (Lode VDV) | versio (Lode VDV)
build error (s) = munta eraro
building block (general) (s) = konstru-komponento
building block (Word) (s) = reuzebla sekcio
built-in (a) = integrita (Bertin) | enkonstruita (Drupalo)
built-in toolbar (s) = integrita ilobreto | enkonstruita ilobreto
bulk (a) = amasa
bulk copy (s) = amase kopii
bulk encryption (s) = amasa ĉifrado

bulk export (s) = amasa eksportado
bulk import (s) = amasa importado
bulk load (s) = amasa ŝargado
bulk mailing (s) = amasa poŝtado (Maŭro)
bulk storage (s) = amasmemorado (Maŭro)
bullet (s) = bulo (KompLeks, OOo, Abiword)
bullet character (s) = bulosigno
bullet symbol (s) = bulsimbolo (OOo)
bulleted list (s) = bula listo
bulletin board system (s) = aŝiŝejo (PIV2002, TekVort)
bullets and numbering (s) = buloj kaj numerado (OOo)
bundle (s) = fasko
bundle (v) = kunigi en faskon
bundled (a) = faskigita
burn (CD or DVD) (v) = registri (Bertilo) | skribi (Bertilo)
burn destination (s) = registrota vojo | skribota vojo
bus (s) = buso (PIV2002, Bertin, Pekoteko)
business (s) = komerco (OOo)
business data (s) = komercaj datumoj (OOo)
business intelligence (s) = komerca informuzado
business letter (s) = komerca letero (OOo)
business logic (s) = komerca logiko
business model (s) = komerca modelo
business to business (s) = interkomerca (Lode VDV)
business to consumer (s) = alklenta (Lode VDV)
busy (a) = okupita
busy tone (s) = okupita tono
bullets and numbering (s) = buloj kaj numerado (OOo)
button (s) = butono (KompLeks, OOo, KompList)
button ad (s) = butona reklamaĵo
button bar (s) = butonbreto | butontrabo
bypass (v) = preterpasi | supersalti (Edmundo)
byte (s) = bajto (PIV2002, OOo) | bitoko (PIV2002)
cabinet file (s) = cab-arkivo
cable (s) = kablo
cable connection (s) = perkabla konekto
cable modem (s) = kabla modemo
